

PER VIA ĜISFINA PERSISTO VI SAVOS VIN MEM – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Luko 21, 5-19

En tiu tempo kelkaj parolis pri la beleco de la templo, pro la ŝtonoj ĝin ornamantaj kaj la votaj oferdonoj de la fideluloj. Tiam Jesuo diris: «Venos tagoj, kiam ĉio, kion vi nun vidas, estos detruida. Ne restos ĉi tie ŝtono sur ŝtono».

Tiam ili demandis Lin: «Majstro, kiam ĉi tio okazos? Kaj kiu estos la signo, ke ĉi tio alvenos?». Jesuo respondis: «Estu singardaj, por ke oni ne trompu vin. Ĉar multaj sin prezentos en mia nomo, dirante: “Mi estas la Mesio!”, aŭ: “La tempo alvenis”. Sed vi ne aŭskultu kaj ne sekvu ilin. Kiam vi aŭdos pri militoj kaj tumultoj, ne timu. Tiaj faktoj devas okazi antaŭe, sed tio ne signifas, ke tuj estos la fino».

Poste Jesuo diris al ili: «Leviĝos nacio kontraŭ nacio kaj regno kontraŭ regno. Estos ĉie grandaj tertremoj, malsato kaj pestoj, kaj grandaj signoj en la tero kaj en la ĉielo.

Sed antaŭ ĉi tio ili persekutos kaj kaptos vin; ili kondukos vin al siaj tribunaloj kaj al malliberejoj, trenante vin antaŭ reĝoj kaj regantoj, pro mia nomo. Tiam vi atestos pri Mi. Estu sentimaj! Ne zorgu pri via defendo: Mi mem donos al vi la ĝustajn vortojn kaj tian saĝon, ke viaj kontraŭuloj ne povos rezisti nek kontraŭdiri.

En tiu tempo vi estos perfidataj eĉ de gepatroj kaj fratoj, de parencoj kaj amikoj. Kelkajn el vi oni mortigos. Vi estos malamataj de ĉiuj pro mia nomo. Sed eĉ ne unu haro de via kapo pereos. Per via ĝisfina persisto vi savos vin mem».

La ĉidimanĉa liturgio prezentas al ni pecon kiu volas esti kuraĝiga por la kristanaj komunumoj kiuj estas submetataj al eksteraj atakoj flanke de

religio, de regantoj, sed ankaŭ internaj flanke de propraj familianoj. La vortoj de Jesuo do ne volas timigi, sed maltimigi, ne volas senkuraĝigi la kredantojn, sed ilin kuraĝigi.

La peco komenciĝas per la admiro kiun la disĉiploj, kiuj ankoraŭ ne komprenis la novaĵon alportitan de Jesuo, havas por la templo. La evangeliisto skribas: *En tiu tempo kelkaj, li celas la disĉiplojn, parolis pri la beleco de la templo, pro la ŝtonoj ĝin ornamentaj kaj la votaj oferdonoj de la fideluloj.* Nu Jesuo estis deklarinta la templon kavernon de rabistoj, templon en kiu Dio iĝis sangosuĉanto, kiu anstataŭ komuniki la vivon al siaj fideluloj, ĝin forprenis de ili, kiel en la epizodo kiu antaŭas ĉi tiun pecon, tiu de la vidvino kiu, mizerulino, elĉerpadis sian sangon por vivteni la Dion kiu ŝin ekspluatis.

Dio, en la malnova Testamento, en la Leĝo, antaŭvidis ke per la enspezoj de la templo oni devintus vivteni ĝuste la plej malfortajn kategoriojn, reprezentatajn de la vidvino. Nu la religia institucio misformis la vizaĝon de Dio kaj ne nur per la enspezoj de la templo oni ne vivtenis la vidvinojn, sed estis la vidvinoj, la plej malforta parto de la socio do, kiuj devis elĉerpi sian sangon por vivteni tiun sangosuĉantan Dion.

Jesuo ne plu toleras ĉion tion, kaj do al la admiro de la disĉiploj Jesuo respondas: *“Venos tagoj, kiam ĉio, kion vi nun vidas, estos detruita. Ne restos ĉi tie ŝtono sur ŝtono.”*

Ĉi tiu estas la unua el la grandaj ŝanĝoj kiuj okazos en la historio. Ĉiu religia kaj civila institucio kiu kontraŭstaras la bonon de la homo, kiu ekspluatas la homon, kiu humiligas la homon, Jesuo certigas nin – kaj tiu estas la granda espero, la granda certeco de la kredantoj – falos, ankaŭ se tio ŝajnas ne ebla, kiel la templo de Jerusalemo, unu el la mondaĵoj, brilego kiel admiras tiuj disĉiploj, ĉio falos.

Ne ekzistas ajna ekonomia, politika, religia povo kiu ekspluatas la homon, lin subpremas, lin humiligas, kiu ne atingos la finon. Kaj Jesuo do vortkuraĝigas la siajn, la kristanan komunumon, atentigante tamen ke ĉio tio ne estos sendolora, ĉar tiu socio ribelos kontraŭ la disĉiploj de Jesuo kiuj anoncas novan mondon.

Jesuo, kaj tiel li seniluziigas siajn disĉiplojn, ne venis por restarigi la mortintan regnon de Israelo, kun ĝia ideo de grandeco, sed li venis por inaŭguri la Regnon de Dio, novan alternativan socion kaj la ĉefaj malamikoj de tiu ĉi regno estos tiuj tri sanktaj pilastroj de ĉiu socio, pilastroj kiuj sin

tenas sur valoroj konsiderataj tiom sanktaj por kies defendo oni povas fordoni propran vivon aŭ oni povas forpreni alies vivon, kaj estas Dio, Patrujo kaj Familio, povosistemoj bazitaj sur la oboe.

Al Dio la oboe de la kredanto, per la religiaj reprezentantoj, la civitano kiu devas obej la regnantojn kaj la familio en kiu la edzino devas obei la edzon kaj la filo la patron.

Nu estos ĝuste tiuj tri kadroj kiuj ribelos kontraŭ Jesuon kaj kontraŭ liajn disĉiplojn, ĉar Jesuo prezentis Dion malsama, Dion kiu ne ordonas, sed kiu servas, Dion precipe kiu ne postulas obeon, sed similecon al sia amo.

Do tiuj tri kadroj regataj de la povo kaj de la oboe ribelos kontraŭ la disĉiplojn de Jesuo kiuj, per ilia anonco de socio malsama, vivmodelo tute alia, krizigos ĝuste la bazojn, la radikojn de tiu aŭtoritata socio. Jen kial Jesuo diras "ili estos portitaj antaŭ la regantoj, sed eĉ ene de la familio estos mortiga malamo kiu kaŭzos mortigojn inter parencoj, samfamilianoj.

Kial? Ĉar la aliĝo al Jesuo estos konsiderata kiel krimo tiom grava ke ĝi nuligos eĉ la parencoligojn. Sed Jesuo certigas: "Malgraŭ tiuj suferoj, malgraŭ tiuj neeviteblaj suferadoj, persekutoj, vi estas la gajnintoj". Kaj li konkludas: "*Per via ĝisfina persisto vi savos vin mem.*"

Kaj Jesuo certigas ke eĉ ne haro, la plej eta parto de persono, estos perdita.

Kiu kunlaboras al la mesaĝo de Jesuo do, al la inaŭguro de la Regno de Dio, li jam gajnas kontraŭ tiuj fortoj kiuj ŝajnas superpezaj, kontraŭ tiuj fortoj kiuj subpremas, tiuj povoj kiuj ŝajnas nedetruiblaj, Jesuo certigas nin: "Laboru por la Regno de Dio kaj unu post la alia, komencante de la templo de Jerusalemo, ĉiuj tiuj institucioj dissolviĝos en la nenion".

La peco de la envageliisto daŭrigas per la versiklo 28 en kiu li konfirmas ke temas pri bildo de espero, de savo kaj ne de timo. Jesuo anoncas: "*Kiam komencos okazi tiuj ĉi aferoj, stariĝu kaj levu la kapon ĉar via libero proksimas*". Ne katastrofoj do kiuj timigas la grupon de disĉiploj, sed la anonco de granda vero: ĉio kiu regas, kiu subpremas kaj humiligas la homon, iom post iom en la historio falos.

Tio kuntrenos neeviteblajn suferojn por la membroj de la kristana komunumo, sed tio ne devas ilin senkuraĝigi ĉar ili jam estas la gajnintoj.